

## INSTRUCCIONES

Por favor acepte abrir este documento en pantalla completa.

### HERRAMIENTAS

- Entrar o Salir del Modo de Lectura "**Ctrl + L**"
- Avance o Retroceso de páginas **Flechas " ← y → "**
- Zoom "**Ctrl**" + **Scroll del mouse**
- Ampliación o reducción personalizada "**Ctrl + Y**"
- Búsqueda en el documento "**Ctrl + F**"

## INSTRUKCIOJ

*Akceptu malfermi ĉi dosieron je tutampleksa ekrano.*


### ILOJ

- Eniri / eliri je legadmaniero "**Ctrl + L**"
- Malantaŭeniri / antaŭeniri je paĝoj **uzu klavojn " ← aŭ → "**
- Zomi "**Ctrl + rulilo de la muso**"
- Pligrandigi / malpligrandigi bildon "**Ctrl + Y**"
- Serĉi vortojn "**Ctrl + F**"

# PLENA ILUSTRITA TAŬRVORTARO

## DICCIONARIO TAURINO ILUSTRADO

**ESPAÑOL – ESPERANTO ESPERANTO – ESPAÑOL**  
**HISPANA – ESPERANTO ESPERANTO – HISPANA**




Una aportación de GUILLERMO MACÍAS Y DÍAZ INFANTE  
a las actividades de MEA

**mea**  
meksika esperanto-asocio



PLENA ILUSTRITA  
**TAŬRVORTARO**  
DICCIONARIO TAURINO ILUSTRADO  
ESPAÑOL – ESPERANTO ESPERANTO – ESPAÑOL  
HISPANA – ESPERANTO ESPERANTO – HISPANA



Escrito y traducido por / Verkita kaj tradukita de  
**GUILLERMO MACÍAS Y DÍAZ INFANTE**


Con la consultoría para las frases ejemplificativas, de /  
Kun la konsultado por la ekzemplaj frazoj, al  
**JUAN PABLO MACÍAS MONTES**

Ilustrado con / Ilustrita kun  
Fotografías de / Fotografajoj de  
**RUBÉN ALBERTO LÓPEZ GONZÁLEZ**  
Dibujos a mano de / Manfaritaj desegnaĵoj de  
**JOSÉ ALBERTO TISCAREÑO RODRÍGUEZ**

Edición y publicación del autor, como una aportación para las actividades de /  
Eldono kaj publikigo de la aŭtoro, kiel alportado por la agado de

**me★a**  
meksika esperanto-asocio

Primera Edición / Unua eldono  
Aguascalientes, México, 2013



Plaza de Toros Monumental de Aguascalientes  
Taŭroplaco Monumenta de Aguaskalientes

Guillermo Macías y Díaz Infante @ Todos los derechos reservados / Ĉiuj rajtoj rezervitaj

Todas las fotografías y dibujos son propiedad de sus respectivos autores y se publican con permiso legal de los mismos.  
Ĉiuj fotoj kaj desegnaĵoj estas propraj de la koncernaj aŭtoroj kaj ilin oni publikigas kun leĝa rajtigo de ties proprantoj.

Una aportación del autor para las actividades de /  
Alportado de la aŭtoro por la agado de



Consulte nuestra página / Vizitu nian paĝaron

<http://meksikoesperanto.org>

Correo electrónico / Retadreso

[meksika.esperanto.asocio@gmail.com](mailto:meksika.esperanto.asocio@gmail.com)

MEKSIKA ESPERANTO-ASOCIO, A.C.

Aguascalientes, Ags., México

Tel. (+52) 449 152 0241

# PLENA ILUSTRITA TAŬRVORTARO

## DICCIONARIO TAURINO ILUSTRADO

• • •  
Presentación  
Prezentado

# Contenido

<b>Presentación</b>	<b>3</b>
Por el Arq. Francisco Guel Macías	6
Por MEA	8
Prólogo, Guillermo Macías y Díaz Infante	10
Sobre la Asociación	12
<b>Artículos</b>	<b>13</b>
Sobre Aguascalientes	15
El Jardín de San Marcos	17
¿Qué es el Esperanto? Vicente Valdés Bejarano	18
¿Qué es el toreo? Gustavo Arturo de Alba	19
El Toreo y la Historia, Xavier González Fisher	20
La Fiesta de Toros en Aguascalientes, Jesús Zavala	22
Pérez Moreno	
Torero, ¿por qué torero? Juan Pablo Macías Montes	26
Macías Montes	
El Decreto de la Fiesta de Toros como patrimonio inmaterial	28
Aguascalientes, la ciudad	30
<b>Aclaraciones y tecnicismos lingüísticos</b>	<b>31</b>
Aclaraciones, propuestas y enriquecimiento	33
Criterios de traducción	34
Pronunciación	36
Zamenhof, el Esperanto y el toreo	38
Algo sobre el Esperanto, para hispanoparlantes	40
<b>Vocabulario temático ilustrado</b>	<b>41</b>
Los eventos taurinos	43
La plaza	44
Instrumentos del toreo	46
Toros	48
El traje	51
Los hombres del toreo	52
La corrida	54
Los actos del toreo	56
Toreando	60
El triunfo	63
Más allá de la plaza	64
<b>Vocabulario temático explicado</b>	<b>65</b>
Los eventos taurinos	67
La plaza	68
Instrumentos del toreo	70
Toros	72
El traje	73
Los hombres del toreo	74
La corrida	76
Los actos del toreo	76
Toreando	79
El triunfo	82
Más allá de la plaza	82
<b>Vocabulario alfabético Español – Esperanto</b>	<b>83</b>
<b>Vocabulario alfabético Esperanto – Español</b>	<b>89</b>
<b>Palabras esperantizadas y dichos taurinos</b>	<b>95</b>
<b>Algunas plazas de toros mexicanas</b>	<b>99</b>
<b>El autor, el productor y los ilustradores</b>	<b>105</b>

# Enhavo

<b>Prezentado</b>	
Fare de Ark. Francisco Guel Macías	
Fare de MEA	
Antaŭparolo, Guillermo Macías y Díaz Infante	
Pri la Asocio	
<b>Artikoloj</b>	
Pri Aguascalientes	
Ĝardeno Sankt-Marko	
Kio estas Esperanto? Vicente Valdés Bejarano	
Kio estas toreado? Gustavo Arturo de Alba	
Toreo kaj Historio, Xavier González Fisher	
La Festo de Taŭroj ĉe Aguascalientes, Jesús Zavala	
Pérez Moreno	
Torero, ĉkial torero? Juan Pablo Macías Montes	
Macías Montes	
Dekreto pri Taŭrofestoj kiel nemateria heredaĵo	
Aguascalientes, la urbo	
<b>Klarigoj kaj lingvaj teknikaĵoj</b>	
Klarigoj, proponoj kaj enriĉigo	
Kriterioj pri tradukado	
Elparolado	
Zamenhof, Esperanto kaj toreo	
Sciigo pri Esperanto por hispanparolantoj	
<b>Ilustrita laŭtema vortaro</b>	
Taŭrokazaĵoj	
Toreejo	
Toreadiloj	
Taŭroj	
Kostumo	
Toreadhomoj	
Taŭrkurado	
Toreagado	
Toreadi	
Sukceso	
Ekstere de la placo	
<b>Eksplikita laŭtema vortaro</b>	
Taŭrokazaĵoj	
Toreejo	
Toreadiloj	
Taŭroj	
Kostumo	
Toreadhomoj	
Taŭrkurado	
Toreagado	
Toreadi	
Sukceso	
Ekstere de la placo	
<b>Alfabeta vortaro Hispana – Esperanto</b>	
<b>Alfabeta vortaro Esperanto – Hispana</b>	
<b>Esperantigitaj vortoj kaj diraĵoj</b>	
<b>Kelkaj meksikaj taŭroplacoj</b>	
<b>La aŭtoro, la subteninto kaj la ilustrintoj</b>	





Aguascalientes, Otoño de 2013.

### Esperantistas, taurinos y amigos del mundo:

Como político y servidor público me entusiasma siempre todo evento, acción o actividad que contribuya al desarrollo positivo y mejoramiento de la comunidad.

Por ello decidí de manera personal apoyar la actividad de Meksika Esperanto-Asocio, A.C., la asociación nacional esperantohablantes, para que a través de este “Taŭrvortaro”, el Diccionario Taurino Ilustrado, Español-Esperanto, obra que por sí misma difunde el conocimiento de la lengua internacional, esa actividad contribuya a dar a conocer Aguascalientes ante mundo y lleve el Esperanto al mundo taurino.

Invito a los esperantistas de todos aquellos países donde la fiesta de toros es desconocida y sobre todo malentendida, para que se adentren a través de la maravillosa lengua internacional, en el conocimiento de esta actividad que a través del espectáculo nos regala arte y eleva el espíritu del hombre ante la actividad artística del torero que juega su vida ante la brutal fuerza de la naturaleza.

Desde luego, como hidrocálido de corazón, también invito a los esperantistas del mundo a que visiten Aguascalientes, una agradable ciudad en el centro de México, que los recibirá siempre con la característica hospitalidad mexicana, la que siendo parte de nuestra esencia nacional, coincide con los postulados de Zamenhof para la comprensión entre todos los pueblos del mundo.

Y también desde luego exhorto a los taurinos de Aguascalientes, de México, de España y de los demás países donde se vive la fiesta de toros a adentrarse en el conocimiento del Esperanto, lengua a través de la cual podrán compartir muchos “olés” con nuevos aficionados del mundo entero.

Atentamente  
**Arq. Francisco Guel Macías**

Aguascalientes, aŭtuno de la jaro 2013<sup>a</sup>

### Esperantistoj, taŭrŝatantoj kaj amikoj el la tuta mondo:

Kiel politikisto kaj registara funkciulo, min entuziasmigas ĉiuj evento, ago aŭ agado kiuj kontribuu al la pozitiva evoluigo kaj pliboniĝo de la komunumo.

Tial mi decidis privatmaniere apogi la agadon de Meksika Esperanto-Asocio, A.C., la nacia asocio de meksikaj esperantistoj, por ke pere de tiu ĉi “Plena Ilustrita Taŭrvortaro”, Hispana-Esperanto, verkaĵo kiu mem disvastigas la lingvon internacian, tiu agado kontribuu diskonigi Aguascalientes-n antaŭ la mondo kaj alportu Esperanton en la taŭromondon.

Mi invitas ĉiujn esperantistojn de ĉiuj landoj kie la taŭrofestoj estas malkonata kaj precipe malkomprenata, ekeniru pere de la mirinda lingvo internacia, en la sciion de tiu ĉi homa agado kiu tra la spektaklo donacas arton al ni kaj levas la homan animon pro la artplena kreado fare de torero kiu riskas sian vivon antaŭ la brutala forto de naturo.

Kompreneble, kiel elkora “varmaakvurbano”, ankaŭ mi invitas tutmondajn esperantistojn viziti Aguascalientes-n, agrabla urbo ĉe la centra parto de Meksiko, urbo kiu ricevos vin ĉiam kun tiu gastameco pro kiu distingiĝas la meksikanoj, eco kiu koincidas kun tiuj postulaĵoj de Zamenhof por la tutmondpopola interkompreniĝo.

Certe ankaŭ mi instigas la taŭrŝatantojn de Aguascalientes, de Meksiko, de Hispanio kaj de la aliaj landoj kie oni vivas la taŭrofeston, eniri en Esperanton, lingvo pere de kiu ankaŭ vi povos ĝui multajn “ol-eojn” kun novaj taŭroŝatantoj de la tuta mondo.

Amike,  
**Francisco Guel Macías**  
“Pako Gel”, Arkitekto



Escudo de la ciudad de Aguascalientes  
Ŝildo de la urbo Aguascalientes



Aguascalientes, otoño de 2013

### Taŭrvortaro, el Diccionario Taurino, una edición con motivo del 125 aniversario del Esperanto

El Esperanto, el idioma internacional creado por una inteligencia genial, ha cumplido 125 años de que fue lanzado al mundo por su creador, Zamenhof, en el ya lejano 1887 en Varsovia, Polonia.

Es en el marco de este significativo aniversario, y con motivo del mismo, que MEKSIKA ESPERANTO-ASOCIO, A.C., la asociación nacional mexicana de Esperanto, recibe esta edición del **Diccionario Taurino Ilustrado**, el **Taŭrvortaro**, obra cuya creación total y traducción integral ha corrido a cargo del Lic. Guillermo Macías y Díaz Infante, quien es uno de los fundadores de la asociación y gran aficionado a la fiesta de toros.

Existe una especial motivación para la preparación y edición de esta obra lingüística. El Esperanto, en cuanto lengua, es un idioma que desarrolla una gran creatividad intelectual y permite la expresión de los más profundos sentimientos humanos. El Toreo es una manifestación artística del espíritu del hombre, a través de la conducción estética de la fuerza bruta de la naturaleza expresada en la natural bravura del toro, conducción que realiza el torero al enfrentarse a esa descomunal potencia arriesgando a cada instante su vida misma. Hay coincidencia entre ambas creaciones —el Esperanto y el Toreo— pues las dos hacen posible el desarrollo de la genialidad del espíritu humano y las dos hacen posible que ese desarrollo sea un arte y produzca un arte. Una produce arte lingüístico; la otra, arte plástico. Nada más alejado de la realidad que la idea de crueldad y salvajismo asociadas a la tauromaquia. Nadie va a la plaza a ver un sufrir un toro ni a deleitarse con la sangre. Lo que hace el torero es conducir al toro —mandarlo— para que obedezca el rojo de la tela y la siga, participando en la creatividad estética de esos movimientos artísticos. El espectador se deleita por esos movimientos. Es el dominio del hombre sobre la naturaleza, aún con grave riesgo de la vida del hombre mismo.


Para difundir el toreo —y su justa esencia— desde la taurina ciudad de Aguascalientes surgió la idea de este diccionario ilustrado. Qué mejor que hacerlo en la lengua internacional que hace factible hacer llegar a muchos pueblos y naciones la esencia real de la tauromaquia, sobre todo, porque el Esperanto, con su riqueza y posibilidades creativas, posibilita la expresión de las esencias, sentimientos y matices de que está lleno el espíritu taurino.

Para llevar al mundo esta obra ha otorgado su invaluable apoyo particular el Arq. Francisco Guel Macías, alto funcionario de gobierno mexicano. Su sensibilidad y voluntad políticas hacen posible que a través de esta hermosa obra lingüística ilustrada, se lleve una imagen de Aguascalientes ante el mundo, al tiempo que es medio para presentar ante muchas naciones, en la lengua internacional, la justa dimensión y la esencia del toreo. MEA le manifiesta su reconocimiento y agradecimiento por la materialización de este proyecto.

Agradecemos también la colaboración de las plumas taurinas que aceptaron la invitación para escribir unas líneas sobre el toreo. Es un honor para el esperantismo taurino mexicano recibir las palabras escritas de tan distinguidos taurófilos en esta obra.

De manera especial destacamos la colaboración de dos artistas. Uno, de la cámara fotográfica, aficionado a la Fiesta de los Toros y además aficionado práctico taurino, el Arq. Rubén Alberto López González, quien ha hecho una gran aportación al "Taŭrvortaro", tanto por la cantidad de material, como por la calidad de las imágenes taurinas. El otro artista es José Alberto Tiscareño Rodríguez —Beto Tiscareño—, genio del dibujo, de quien destacamos su labor ilustrativa a través de hermosas láminas taurinas hechas a mano especialmente para este diccionario. La aportación fotográfica de Rubén López y las ilustraciones a mano de Beto Tiscareño convierten a este diccionario en una obra de arte que sin duda alguna pasará a formar parte de las colecciones taurinas de muchos, aún de los no esperantistas.

Deseamos desde luego que este diccionario contribuya también a la difusión del Esperanto en el medio taurino tanto de Aguascalientes, como en los círculos de taurófilos del resto de México, de los demás países taurinos de la América Latina y desde luego en España y Francia. La Lengua Internacional, llena de posibilidades lingüísticas, de matices y de sentimiento con toda seguridad podrá hacer llegar, de parte de los hispanoparlantes, el toreo —su esencia, su sabor y la hermosura de su arte— a los esperantistas en todos los países del mundo. Olé!



Ludwik Zamenhof\*

Aguascalientes, aŭtunon de la 2013ª jaro.

### Taŭrvortaro, Diccionario Taurino, eldonaĵo okaze de la 125ª datreveno de la kreigo de Esperanto

Esperanto, la lingvo internacia, kreita de genia inteligento, plenumis jam 125 jarojn de kiam ĝi estis lanĉita al la mondo, lanĉo de ĝia kreinto, Zamenhof, la jam foran 1887an, en Varsovio, Pollando.

Kadre de tiu ĉi signifa datreveno kaj okaze de ĝi, Meksika Esperanto-Asocio, A.C., la meksika nacia asocio de Esperanto, ricevas tiun ĉi eldonaĵon de **Plena Ilustrita Taŭrvortaro**, verkaĵo entute farita kaj tradukita de Guillermo Macías y Díaz Infante, advokato, unu el la fondintoj de la asocio kaj granda ŝatanto de la taŭrofestoj.

Ekzistas specialaj kialoj por prepari kaj eldoni ĉi tiun lingvan kreaĵon. Esperanto, kiel lingvo, ebligas gravan disvolviĝon de la intelekta kreadkapablo kaj ebligas la esprimon de la plej profundaj homaj sentoj. Toreado estas arta elmontrado de la homa spirito (animo), pere de la estetika kondukado de la bruta forto de naturo elmontrita ĉe la natura agresemo de la taŭro, kondukadon kiun la toreadoro faras antaŭiĝante tian senmezuran fortegon (potencon), riskante ĉiujn momentojn sian vivon mem. Estas koincido inter ambaŭ kreaĵoj —Esperanto kaj toreado— ĉar

ili ambaŭ ebligas genian disvolviĝon de la homa spirito kaj ambaŭ ankaŭ ebligas ke tiu disvolviĝo estu arto kaj kreu arton. Unu el ili kreas lingvan arton; la alia, plastikan arton. Nenio pli for de la realo estas ke la ideo de krueleco kaj sovaĝemo ligitaj al taŭrokazaĵo. Neniu iras al la placo vidi taŭron suferi nek ĝuadi pro la sango. Kion la toreadoro faras estas konduki la taŭron —regi ĝin— por ke ĝi obeŭ la ruĝan tukon kaj sekvu ĝin, partoprenante la estetikajn kreadon de tiaj artaj movoj. La spektanto ĝuas tiajn movojn. Tio estas la regado de homo super naturo, eĉ riske de la vivo de la homo mem.

Por disvastigi toreadon kaj ties ĝustan esencon, ekde la taŭrema urbo Aguascalientes, ekiĝis, elfontis la ideo pri tiu ĉi ilustrita taŭrvortaro. Kio pli bona ol fari tion pere de la lingvo internacia kiu ebligas alproksimigi al multaj popoloj kaj nacioj, la veran econ de toreado, precipe ĉar Esperanto, pro ties riĉeco kaj kreivaj ebloj, ebligas esprimadon de tiaj ecoj, sentoj kaj nuancoj kiuj plenigas la taŭranimon.

Por alporti al la mondo tiun ĉi taŭrvortaron, disponigis sian multvaloran privatan apogon sinjoro Francisco Guel Macías, arkitekto, alta meksika registara funkciulo. Liaj politikaj kaj senco kaj volo ebligas pere de tiu ĉi bele ilustrita lingva kreaĵo, disvastigi tra la mondo bildon pri Aguascalientes, samtempe ke estas okazo por prezenti antaŭ multaj nacioj, pere de la lingvo internacia, ja la ĝustan kialon, ja la econ de toreado. MEA esprimas al li sian rekonon kaj dankegon pro la ebligado realigi tiun ĉi projekton.

Ni ankaŭ dankas kunlaboradon de gravaj taŭroplumoj kiuj konsentis verki temojn pri toreado. Honoras la taŭreman meksikan esperantismen ricevi verkaĵojn de tiaj elstaraj taŭroŝatantoj.

Speciale ni elstarigas la kunlaboradon de du artistoj. Iu el ili, fotografkamera artisto, ŝatanto de la taŭrofestoj kaj eĉ hobia praktikanto de ĝi, arkitekto Rubén Alberto López González, faris grandan aldonadon al Taŭrvortaro, kaj pro la kvanto de ties fotomaterialo kaj pro la kvalito de tiu toreadbildaro. La alia artisto estas José Alberto Tiscareño Rodríguez —Beto Tiskarenjo—, genia desegnisto, pri kiu ni rimarkas ties ilustrigan laboron pere de belegaj desegnaĵoj faritaj speciale por tiu ĉi vortaro. La fotografa aldonado de Rubén López kaj la manfaritaj desegnaĵoj de Beto Tiskarenjo estigas tiun ĉi vortaron artaĵo kiu sendube estiĝos parto de la taŭrkolektaĵoj de multaj homoj, eĉ de tiuj neesperantistoj.

Ni deziras ke tiu ĉi vortaro kontribuu disvastigi Esperanton en la taŭrocirklojn kaj de Aguascalientes, kaj de Meksiko kaj de aliaj taŭremaj latinamerikaj landoj, kaj kompreneble en Hispanion kaj en Francion. La Lingvo Internacia, plenplena kaj de lingvaj ebloj, kaj de nuancoj kaj de sentoj, certe alportos de la hispanparolantoj, toreadon —ĝian econ, guston kaj ties artan belecon— al la esperantistoj de ĉiuj landoj de la mondo. Ol-e!

**\*Pintura originala al oleo hecha por el artista hidrocálido Juan Velasco -Juan Juan- originario de Calvillo, Ags. Óleo propiedad de Guillermo Macías y Díaz Infante y foto de la pintura, tomada por el mismo propietario.**

**\*Originala pentraĵo je oleo fare de varmaakvurbano Juan Velasco -Juan Juan- naskiĝinta en Kalvijo, Ags. Pentraĵo apartenanta al Guillermo Macías y Díaz Infante kaj fotografaĵo de la propranta mem.**



# Prólogo

*Guillermo Macías y Díaz Infante\**

En mi intercomunicación diaria con amigos de Europa y de otras partes del mundo, gracias a la maravilla del Esperanto, surgía por necesidad el tema de las corridas de toros, mostrando la mayoría de mis interlocutores interés por saber cuál es en realidad la esencia del toreo, interés expresado con ánimo inquieto por conocer esta actividad que encierra pasión, arte y peligro.

Si bien ya para entonces hablaba con fluidez la lengua internacional, debo confesar que me faltaba el vocabulario específico para expresar la información, opiniones e ideas sobre lo taurino a todos ellos, los que desde luego ignoraban todo sobre el toreo.

¿Cómo explicar, en un idioma distinto al Español, por ejemplo a un polaco, lo que es un lance de capote, o a una húngara la suerte de varas, o a un alemán las banderillas, o a una holandesa el arte de citar, templar y mandar a un toro, o a un ruso las tandas de muletazos, o a un eslovaco la oportunidad de un quite, o a una lituana la razón de ser de la suerte suprema?

Entonces me surgió la idea de hacer una lista de palabras, unas veinte o treinta, las básicas, y traducirlas, poniéndolas a la mano en un archivo digitalizado para ser enviado desde luego a mis amigos y posibilitar su consulta.

Sin embargo pronto pude ver que eso no sería suficiente; se necesitaban mucho más palabras y era necesaria además la explicación del concepto de cada una, inclusive por medio de frases con ejemplos y de ser posible con imágenes. Me di a la tarea de formular una lista de unas doscientas palabras. Así, al tener ya la lista que formé en Español, tomé conciencia de la dimensión de mi propósito, pues traducir cada palabra de manera correspondiente a su concepto y esencia y explicar cada una en Esperanto fue como si me hubiera aventado al ruedo para una encerrona con seis toros... pero, ya en el ruedo vi que no podía dar marcha atrás y le salí al toro.

Este trabajo necesitó casi tres años para poder salir al fin por la puerta grande, lo que me es altamente satisfactorio como esperantista y aficionado a los toros.

Me honran sobremanera el apoyo del Arq. Francisco Guel Macías -Paco Guel- para poder publicar la obra; de Rubén López y Beto Tiscareño por su colaboración para la ilustración y de los abogados Jesús Zavala Pérez Moreno -Chucho Zavala- y Xavier González Fisher; de Gustavo Arturo de Alba -Don Gus- y de mi hijo Juan Pablo Macías Montes por sus aportaciones escritas sobre el toreo; agradezco también a Vicente Valdés Bejarano su apunte esperantista.

Esta obra, además de ser un instrumento de difusión del toreo hacia el mundo esperantista y del Esperanto hacia el mundo taurino, es en sí mismo un embajador de la taurina ciudad de Aguascalientes ante el mundo de los esperantoparlantes.

Es, por último, mi reconocimiento personal, como expresión de mi mayor admiración, a esa mente genial que fue el Dr. Zamenhof, creador del Esperanto, la lengua internacional. ¡Olé Maestro!

---

*\* Abogado, Presidente de Meksika Esperanto-Asocio, A.C., aficionado a los toros.*

# Antaŭparolo

*Guillermo Macías y Díaz Infante\**

Dum mia ĉiutaga babilado kun geamikoj kaj de Eŭropo kaj de aliaj mondopartoj, aperadis necese la temo pri taŭruradoj, rilate al kio miaj alparolantoj montradis intereson por scii kio reale estas la eco de toreado, intereso esprimita kun honesta scivolemo pri tiu ĉi agado kiu enhavas kaj pasion, kaj arton kaj danĝeron.

Kvankam tiam mi jam paroladis flue la lingvon internacian, mi devas konfesi ke mankis al mi speciala vortscio por esprimi ideojn, opiniojn kaj informojn pri toreado kaj sciigi tion al miaj interparolantoj kiuj kompreneble malsciis ĉion pri \*toreo.

Kiel ekspliki per diversa lingvo ol la Hispana, ekzemple al polo, tion kio estas tukmovigo de \**kapotjo*, aŭ al hungarino la ŝancon je pikstango, aŭ al germano la banderiladon, aŭ al nederlandino la artan econ kiun enhavas kaj la incito, la alĝustigo kaj la regado de taŭro, aŭ al ruso la vicaron de \**muletjaĵoj*, aŭ al slovako la oportunecon de demeti taŭron de iu, aŭ al litovano la kialon mortigi taŭron?

Tiam elfontis en mi la ideo fari vortliston –kun dudek au tridek, la bazaj vortoj-, kaj traduki ilin kaj enmeti ilin en komputildosieron por sendi ĝin al miaj geamikoj kaj ebligi ties konsulton.

Tamen, baldaŭ mi konsciis ke tio ne sufiĉus; oni bezonus multe pli da vortoj kaj ankaŭ oni bezonus eksplikadon pri ĉiuj vortoj, inkluzive pere de ekzempligaj frazoj kaj, eble, per bildoj. Tiam mi okupiĝis faranta vortliston pli ampleksan ĝis ĝi estiĝis ducentvorta. Tiele, havinte tiun liston kiun mi faris en la Hispana, mi ekkonsciis pri la amplekso de mia celo, ĉar traduki ĉiujn vortojn laŭ maniero kiu atingus la ĝustajn koncepton, sencon kaj econ laŭ la rilata hispana vorto, estis kiel enfermiĝi en taŭroplaca rondo por torei laŭvice ses taŭrojn! Tamen, jam ĉe la rondo mi konsciis ke iri reen ne eblis... kaj mi “stariĝis antaŭ la taŭro”.

Tiu ĉi laboraĵo bezonis preskaŭ tri jarojn por \**“eliri tra la granda pordo”*, kio rezultas al mi tre kontentiga kiel esperantisto kaj kiel ŝatanto de Taŭrofesto.

Honoras min ege la apogo de arkitekto Francisco Guel Macías –Paco Gel- pro ebligi publikigi tiun ĉi verkaĵon; la kunlaborado kaj de Rubén López kaj de Beto Tiskarenjo por ilustrati la vortaron, kaj de la advokatoj Jesús Zavala Pérez Moreno –Ĉuĉo Zavala- kaj de Xavier González Fisher, kaj de Gustavo Arturo de Alba –Don Gus- kaj de mia filo Juan Pablo Macías Montes pro ties verkaĵoj pri \*toreo; mi ankaŭ dankas al Vicente Valdés Bejarano sian priesperantan verkaĵon.

Tiu ĉi bildvortaro, krom esti disvastigilo de \**toreo* en Esperantujo kaj de Esperanto en la taŭromondon, ja estas mem ambasadoro de la taŭrema meksika urbo Aguascalientes antaŭ Esperantujo.

Ĝi estas, finfine, la monstro de mia plej granda admiro je tiu genio kiu estis Dr-o. Zamenhof, kreinto de Esperanto, la lingvo internacia. Ol-e, Majstro!

---

*\* Advokato, Prezidanto de Meksika Esperanto-Asocio, A.C., ŝatanto de la taŭrofesto.*





## ¿Quiénes somos?

**MESIKA ESPERANTO-ASOCIO, A.C.**

- Nuestro objeto es **difundir, enseñar y hablar el Esperanto**, la lengua internacional.
- También queremos **difundir** la cultura, modo de vida y **la realidad de México** al mundo.
- Posibilitamos la **creación de relaciones** de amistad, sociales, culturales y económicas.
- MEA organiza **cursos** presenciales de Esperanto.
- Enseñamos el Esperanto **a distancia** y apoyamos su aprendizaje autodidacta.
- Somos la **única asociación** con capacidad legal para enseñar Esperanto en México.
- Organizamos y participamos en **congresos y encuentros** de esperantistas.
- Promovemos y apoyamos la creación de **clubes** de aprendizaje y práctica de Esperanto.
- Editamos y publicamos **libros, revistas y material** de Esperanto.
- Legalmente facultada para operar en todo el país, es la **única institución esperantista** que tiene el derecho de afiliarse a otras organizaciones de esperantistas.
- La sede de la asociación está en **Aguascalientes**, Ags., México.
- Fundada el 17 de Julio de 2010, cuenta con los **permisos del gobierno** mexicano.

**meada**  
meksika esperanto-asocio

## Kiuj ni estas?

**MESIKA ESPERANTO-ASOCIO, A.C.**

- Nia **ĉefcelo** estas disvastigi, instrui kaj paroligi **Esperanton**, la lingvo internacia.
- Ni ankaŭ celas **ekkonigi la meksikajn** kulturon, vivmanieron kaj realon al la mondo.
- MEA ja celas **ebliigi** sociajn, amikajn, kulturajn kaj ekonomiajn **internaciajn rilatojn**.
- MEA organizas **kursojn** de Esperanto.
- Ni **distance instruas** Esperanton kaj apogas ties **memlernantojn**.
- Ni estas la **nura asocio** en Meksiko kiu leĝe kapablas instrui Esperanton.
- Nia asocio organizas kaj partoprenas **kongresojn kaj renkontiĝojn** de esperantistoj.
- Ni estigas kaj subtenas kreadon de **klubo** por la lernado kaj praktikado de Esperanto.
- MEA eldonas kaj publikas **librojn, revuojn kaj materialon** pri Esperanto.
- Leĝe rajtigita por agadi tutlande, MEA estas la **nura esperantista institucio** kiu rajtas aligi aliajn organizaĵojn de esperantistoj.
- Ties sidejo estas la urbo **Aguascalientes**, Ags., Meksiko.
- Fondita je la 17<sup>a</sup> de Julio de 2010, laŭ **permesoj** de la meksika registaro.



## PLENA ILUSTRITA **TAŬRVORTARO** DICCIONARIO TAURINO ILUSTRADO

Artículos  
Artikoloj



# Aguascalientes: qué, cuánto, cómo, cuándo, etc.

México tiene ya más de 116 millones de habitantes sobre un territorio de 2 millones de kilómetros cuadrados. En Aguascalientes, uno de los más pequeños estados del país, pues sólo poco más de cinco mil kilómetros cuadrados lo conforman, habitan 1.2 millones de personas (en proporción de 51-49 por ciento). Sin embargo, en el estado hidrocálido se encuentra la novena más grande área metropolitana del país, según su número de habitantes, la ciudad homónima, con un millón de personas.

*El Estado actualmente es industrial de manera principal, en razón de la fabricación de textiles, automóviles y aparatos e instrumentos eléctricos; muy importante es la industria de verduras congeladas y de la horticultura. Sobresale también la fabricación de mobiliario para tiendas y supermercados. La metrópoli hidrocálida fue durante décadas la capital ferrocarrilera del país.*

Por otra parte, agriculturalmente el Estado produce anualmente más de cuarenta y cinco mil toneladas de maíz, nueve mil de ajo, ocho mil de jitomate y dos mil de frijol. Aguascalientes es el más importante productor de guayaba en el mundo (un fruto dulce, el más rico en vitamina C). En cuanto a la carne, el Estado produce más de doscientas mil toneladas de pollo, más de dieciocho mil de res y más de diez mil de puerco. Importante es la industria de lácteos, en razón de la producción de más de trescientos setenta mil litros de leche. La cosecha de miel de abeja alcanza cuatrocientas toneladas anualmente.

Aguascalientes –que se localiza en la parte central de México– es principalmente una región semiárida; sin embargo tiene casi quinientas hectáreas de bosques, principalmente en las montañas cuyo punto más alto alcanza los 3,050 metros sobre el nivel del mar; el punto más bajo está a 1,600 metros. La altitud promedio en la parte del valle central es 1,900 metros.

A razón de cuatro habitantes en promedio, los aguascalentenses habitan en cerca de trescientas mil viviendas, de las cuales todas tienen electricidad y agua potable; en cada hogar hay televisión y un tercio tiene computadora. Funcionan en el Estado cerca de dos mil escuelas de educación básica y media; casi un millón de personas tienen derecho a los servicios públicos de salud. Trabajan en la capital más de ciento treinta y siete mil profesionistas. Además de la industria, en el Estado existe una importante actividad comercial y de gran variedad de servicios en campos económicos tales como el turismo, salud, enseñanza, transporte, servicios profesionales y de la industria de la construcción.

A Aguascalientes se puede llegar desde todo el país a través de una muy buena red de carreteras, por automóvil o por servicio de autobuses de alta calidad y, desde luego, a través del aeropuerto internacional. ¡Sean bienvenidos!

*(Artículo original en Esperanto, escrito por Guillermo Macías y traducido al Español por el propio autor)*





# Aguascalientes: kio, kia, kiom, kiel, kiam, ktp...

Meksiko havas jam pli ol 116 milionojn da loĝantoj sur teritorio de 2 milionoj da kvadrataj kilometroj. En Aguascalientes, unu el la plej malgrandaj ŝtatoj de la lando, ĉar nur iom pli ol kvinmil kvadrataj kilometroj estigas ĝin, loĝas 1.2 milionoj da homoj (51-49 procenta virina/vira proporcio). Tamen, en la "varmaakva" ŝtato troviĝas la naŭa metropola areo de la lando laŭ nombro da loĝantoj, la samnoma ĉefurba metropolo, kun unu miliono da homoj.

*La ŝtato nuntempe estas pleje industria, precipe pro fabriko de teksaĵoj, aŭtomobiloj kaj elektraj aparatoj, iloj kaj aĵoj; tre grava estas la industrio kiu produktas glaciigitajn legomojn kaj hortikulturaĵojn. Staras ankaŭ fabrikado de bretaro por la superbazara komerco. La "varma-akva" metropolo estis dum jardekoj la fervojista ĉefurbo de la lando.*

Aliflanke, agrikulture, la ŝtato produktas jare pli ol kvardek kvin mil tunojn da maizo, naŭmil da ajlo, okmil da tomato kaj dumil de fazeoloj. Aguascalientes estas la plej grava produktanto de gujavo en la mondo (dolĉa frukto, la plej riĉa je vitamino C). Pri viando, la ŝtato produktas pli ol ducent mil tunojn da kokaĵo, pli ol dek ok mil da bovaĵo kaj pli ol dekmil de porkaĵo. Grava estas la industrio de laktaĵoj, sekve de la produktado de pli ol tricent sepdek mil litroj da lakto. La rikolto de abela mielo atingas kvarcent tunojn jare.

Aguascalientes –kiu lokiĝas en la centra parto de Meksiko– estas pleje semidezerta regiono; tamen ĝi enhavas preskaŭ kvincent hektareojn da arbaroj, precipe en montaroj, kies plej alta punkto atingas 3,050 metrojn sur marnivelo; la plej malalta estas je 1,600 metrojn. La averaĝa alteco en la centra vala parto estas 1,900 metrojn.

Po kvar loĝantoj averaĝe, aguascalientesanoj loĝas en preskaŭ tricent mil loĝejoj, el kiuj ĉiuj havas elektron kaj akvoservon; en ĉiuj hejmoj estas televidilo kaj la triono havas hejmkomputilon. Funkcias en la ŝtato preskaŭ dumil baz- kaj mezlernejoj; preskaŭ unu miliono da homoj rajtas ŝtatajn sanservojn. Laboras en la ĉefurbo pli ol cent tridek sep mil profesiuloj. Krom industrio, en la ŝtato estas grava komerca agado kaj multflanka servofarado ĉe ekonomiaj kampoj tiel kiel turismo, sano, instruado, transportoj, profesiaj servoj kaj konstruadindustrio.

Al Aguascalientes oni povas alveni el la tuta lando tra bonega reto de ŝoseoj, veturilo aŭ pere de altkvalita busa servo kaj kompreneble, tra la internacia flughaveno. Estu bonvenaj!

*(Verkajo originale en Esperanto, de Guillermo Macías)*



# El Jardín de San Marcos "Ĝardeno Sankt-Marko"

En la ciudad mexicana de Aguascalientes se encuentra un parque denominado "Jardín de San Marcos", cuyo nombre proviene desde su construcción, a mediados del siglo XIX. Una balaustrada de cantera, que forma un cuadro, con cuatro entradas semejantes a un arco, lo rodea.

Después de la conquista española de México (año de 1521), junto a algunos de las recién fundadas ciudades y villas, se fundaba también un "pueblo de indios", para la población de indígenas a quienes hacían trabajar para ellos los conquistadores españoles.

Aunque Aguascalientes fue fundada originalmente como un fuerte en un lugar de manantiales de aguas termales en el año de 1575, fortificación para la protección de las "conductas", carros de caballos que, frecuentemente formando convoyes, transportaban oro y plata del lejano norte de la Nueva España hasta su capital, pronto se convirtió en una pequeña ciudad. Los conquistadores, haciendo trabajar a los indígenas en la construcción de la ciudad y en la explotación de la región, rápidamente la hicieron crecer. Así, se estableció en el año 1604, muy cerca de la joven ciudad, el denominado "pueblo de indios de San Marcos". En razón de la corta distancia entre la villa española y el pueblo de indios, ambos asentamientos pronto se conurbaron resultando una ciudad más grande.



A comienzos del siglo XIX se estableció en la ciudad una feria anual de comerciantes, feria que se realizaba los primeros años en el centro de la ciudad, pero por la existencia de un vasto terreno entre la iglesia del otrora pueblo de indios y las primeras casas de la ciudad, se decidió trasladar la realización de la feria a ese amplio espacio y hacerla coincidir con la fiesta religiosa en honor de San Marcos (el 25 de Abril). Con igual fin se decidió también establecer, en ese amplio terreno localizado ante el templo católico, un gran jardín y, por tal motivo, se construyó alrededor de él una hermosa balaustrada. El jardín fue solemnemente inaugurado durante la Feria del año 1847. Desde luego la feria también se denominó "de San Marcos".

Desde entonces, constituyéndose en la fiesta de primavera de Aguascalientes, anualmente se realiza la feria, la que actualmente se denomina "Feria Nacional de San Marcos", evento que atrae entre cinco y siete millones de personas a la ciudad, durante su duración de tres semanas.

*(Artículo original en Esperanto, escrito por Guillermo Macías y traducido al Español por el propio autor)*

En la meksika urbo Aguascalientes troviĝas parko kiu nomiĝas "Ĝardeno Sankt-Marko", parko tiel nomata ekde ĝia konstruo, je la mezo de la XIX-a jarcento. Kvadratforme, ĝin ĉirkaŭas kalkoŝtona balaŭstrado kun kvar arkoformaj ĉiufankaj enirejoj.

Depost la hispana konkero de Meksiko (en la 1521<sup>a</sup> jaro), apud kelkaj juse fonditaj urbetoj aŭ vilaĝoj, ankaŭe fondiĝis "pueblo de indios" (pue-blo de in-di-os) (porindiĝenan vilaĝon) por la loĝado de aŭtoktonuloj kiujn laboradigis la hispanaj konkerintoj.

Kvankam Aguascalientes estis fondita origine kiel fortikaĵo ĉe loko de fontoj de varma akvo en la jaro 1575<sup>a</sup>, fortikaĵo por la protektado de "conductas" (kon-duk-tas), ĉevalĉaroj, ofte areaj, kiuj transportis oron kaj arĝenton de la fora nordo de Novhispanio ĝis ties ĉefurbo, baldaŭ transformiĝis en urbeto. La konkerintoj, eldeviginte indiĝenojn laboradi por la konstruado de la urbo kaj por la ekspluatado de la regiono, rapide kreskigis ĝin. Do, oni establis en la jaro 1604<sup>a</sup>, tre apude de la juna urbeto, la nomatan "pueblo de indios de San Marcos" (san mar-kos; "porindiĝena vilaĝo Sankt-Marko"). Kaŭze de la mallonga distanco inter la urbeto de hispanoj kaj la indiĝena vilaĝo, ambaŭ loĝlokoj baldaŭe kuniĝis kaj rezultis pli granda urbo.

Komence de la XIX-a jarcento establigis en la urbo jaran foiron de komercantoj, foiro kiu okazadis, la unuajn jarojn, ĉe la centra parto de la urbo, sed pro la ekzisto de vasta tereno inter la preĝejo de la iama indiĝena vilaĝeto Sankt-Marko kaj la unuaj domoj de la urbo, oni decidis translokigi la okazadon de la foiro al tiu vasta spaco kaj fari ĝin koincidi kun la religiaj festoj honore de Sankta Marko (la 25an de Aprilo). Samcele oni ankaŭ decidis establi, ĉe tiu vasta tereno lokiĝita antaŭ la tiea katolika preĝejo, grandan ĝardenon kaj do, tiucele, oni konstruis ĉirkaŭ ĝi belan balaŭstradon. La ĝardeno solene estis inaŭgurita dum la Foiro de la jaro 1847<sup>a</sup>. Kompreneble, la foiro ankaŭ nomiĝis "de Sankt-Marko".

De tiam, estigante la printempan feston de Aguascalientes ĉiujare okazas la foiro, kiu nuntempe realiĝas laŭ la nomo je "Nacia Foiro de Sankt-Marko", evento kiu altiras inter kvin ĝis sep milionojn da homoj al la urbo, dum ties trisemajna okazado.

*(Verkajo originale en Esperanto, de Guillermo Macías)*





## ¿Qué es el Esperanto?

Vicente Valdés Bejarano\*

Es la aportación lingüística más importante en la historia de la humanidad, aportación realizada por el polaco Dr. Lázaro L. Zamenhof en el año 1887. Como contribución lingüística, es un idioma cuyo diseño, por su estructura, permite considerarlo el más fácil de aprender en el mundo, ya que se trata de un idioma regular en sus terminaciones, simplificado en su gramática, lógico en su estructura, flexible en su sintaxis, aglutinante por excelencia y expresivo en sus formas.

El Esperanto es un idioma construido a partir de raíces internacionalmente comunes y terminaciones regulares. Posee un sistema lógico de afijos (*sufijos y prefijos*) que permiten simplificar de manera exponencial el aprendizaje de términos y frases y esto gracias a la gramática abreviada que se reduce a sólo 16 reglas básicas fundamentales que le dan un toque de gran familiaridad para cualquier persona de cualquier parte del mundo.

Una de estas reglas, por ejemplo, se hará evidente en este diccionario taurino, ya que todos los sustantivos (*palabras que dan nombre a los objetos o conceptos abstractos*) terminan en “o” conforme a la gramática del Esperanto.

Leamos pues ahora y aprendamos nuevos sustantivos.

\*“Chente” es un destacado esperantista, originario de la ciudad de México, cofundador de Meksika Esperanto-Asocio, A.C. y traductor al Esperanto de un sinnúmero de canciones, entre ellas populares mexicanas, incluyendo las famosas canciones infantiles de Cri Cri.



## Kio estas Esperanto?

Vicente Valdés Bejarano\*

Ĝi estas la plej grava lingva kontribuo kiun la homaro povus atesti en la tuta historio, donita de D-ro. Ludoviko Zamenhof en la jaro 1887<sup>a</sup>. Tiu kontribuo temas pri lingvo kies struktura skizo nin permesas konsideri ke ĝi estas la plej facila lernebla lingvo en la tuta mondo ĉar ĝi estas regula lingvo en siaj finaĵoj, kun simpliga gramatiko, logika strukturo, sintakse fleksebla, kunmetitebla lingvo kaj tute sprimebla.

Esperanto estas konstruita lingvo el komunaj radikoj internacie konataj kun regulaj finaĵoj. Ĝi enhavas logikan sistemon de afiksoj (*sufiksoj kaj prefiksoj*) kiuj permesas simpligi eksponencialmaniere la lernadon de vortoj kaj frazoj ankaŭ dank’ al resumiga gramatiko kiu reduktas je nur 16 esencaj reguloj kiu donas lingvan familiarecon al homoj el ĉiuj mondopartoj.

Regulo kiu rezultos, ekzemple, evidenta dum la legado de tiu ĉi Taŭrvortaro estas la finaĵo “o” por ĉiu sustantivo laŭ la Esperanto-gramatiko.

Ni legu tuj kaj lernu novajn sustantivojn.

\*Ĉente estas staranta meksika esperantisto, naskiĝinta en Meksiko-urbo, kunfondinto de Meksika Esperanto-Asocio, A.C. kaj tradukinto en Esperanton, de sennombra kantaro, inter ili, meksikaj popolkantoj, inkluzive la mondfamaj porinfanaj kantoj de Kri Kri, la kantista grileto.

## ¿Qué es el toreo?

Gustavo Arturo de Alba\*

A riesgo de caer en perogrulladas a la pregunta de ¿qué es la esencia del toreo? la respondo como la capacidad que tiene el hombre para enfrentarse a un toro sólo con la ayuda de un capote y muleta, obligando, al animal, a seguir la trayectoria de ellos, buscando que sus astas pasen lo más cerca posible de su cuerpo, para dominarlo, someterlo y producir un fugaz momento de plasticidad estética, con lo cual se logra una composición artística, provocando la reacción emocionada de los espectadores del quehacer del torero.

El mero sometimiento o dominio de la bestia no es suficiente para que estemos ante una obra artística; se requiere que el torero muestre su capacidad para obligar al toro a seguir el vuelo del capote o la muleta a una velocidad y ritmo que impone el hombre, el cual, en la medida de ser lo más lento y cerca de lo posible, estará consiguiendo una composición armónica, hermosa, en fin artística, cuya transmisión a los tendidos hará que se provoque el alarido aprobatorio del ¡olé! con el cual quedará sancionada la creación del torero y por ende la esencia del toreo.

\* “Don Gus”, Periodista desde 1970. Cronista taurino y crítico de cine. Director de las revistas electrónicas Crisol Plural ([www.crisolplural.com](http://www.crisolplural.com)) y Cineforever.



## Kio estas toreado?

Gustavo Arturo de Alba\*

Riske de paroli \*\*“perogruje” por respondi la demandon ¿kio estas le esenco de toreo?, mi respondas ĝin dirante ke ĝi estas kapablo de homo por stariĝi antaŭ agresa taŭro, nur kun tukhelpilo –aŭ \*kapotjo aŭ \*muletjo- celante obeigi la beston por ke ĝi sekvu la movantan tukon, kaj ankaŭ celante ke la taŭrokornoj pasu plejeble proksime de la korpo de la toreadoro mem, tiele regante la taŭron kaj do okazante efemeran estetikan momenton, pere de kio oni kreas artan komponaĵon, torera agado kiu kaŭzas emocian reagon al la spektantoj.

La nura regado sur la besto ne sufiĉas por krei artaĵon. Necesas ke la torero montru sian kapablon obeigi la taŭron sekvi la \*kapotjon –aŭ la \*muletjon- laŭ la rapideco –aŭ malrapideco- kaj laŭ la ritmo kiujn la homo imponas, movoj kiuj ju pli malrapidaj kaj proksimaj –tiuj de la torero, de ties tromptukon kaj de la taŭro- des pli belaj kaj artplenaj, tiele estiĝantaj harmonia komponaĵo kies perceptigo de la spektantaro okazigos laŭdan \*“ol-ean” ekkriadon, kio sankcios la toreran kreaĵon kaj do la esencon de toreado.

\* “Don Gus”, ĵurnalisto ekde 1970. Taŭrkronikisto kaj kino-kritikisto. Direktoro de la elektronikaj gazetoj “Crisol Plural” ([www.crisolplural.com](http://www.crisolplural.com)) –Plurala Krisolo- kaj “Cineforever” –Kinoporĉiam-.

\*\* NT.- “perogruje” estas esperantigo fare de la tradukinto. Ĝi devenas de la hispana vorto “perogrullada”, siavice deveninta de legenda homo de la hispana literarturo, Pero Grullo, kiu diradis “verajn verojn”, nu, pleonasmajn.



# El toreo y la historia

Xavier González Fisher\*

El inicio de la interacción del hombre con el toro – entendido en términos *gassetianos* como un macho bovino que tiene *casta, poder y pies* – está perpetuada desde las cuevas de **Altamira** hasta los frescos de **Cnosos**. Esa interacción va desde lo utilitario hasta lo lúdico, pues lo que un día representó utilidad, al cabo del tiempo puede convertirse en juego.

Sin embargo, la fiesta de los toros, como la concebimos hoy, deriva más bien de los entrenamientos para las guerras que en la **Reconquista de España** se daban. **José Alameda** explica a partir de esos hechos del Siglo XV de nuestra era los orígenes del actual toreo y afirma que ni de las cacerías pintadas en **Altamira** o de las taurocatapsias de **Cnosos** se puede deducir una relación de causa a efecto con lo que hoy vemos en los ruedos.

Personalmente considero esa teoría *alamediana* como la más congruente con el camino seguido por las fiestas con toros hasta nuestros días, y así, veremos que el toreo fue primero ecuestre, era el entrenamiento de las caballerías – árabes e hispanas – para la guerra. El alanceamiento de toros reproducía en buena medida el enfrentamiento con otro lancero. Después, siguiendo al invocado **Alameda**, al terminar las **Guerras de Reconquista** la caballería se convirtió en una especie de cauce de un río seco, lo que llevó esos originales juegos de guerra a las plazas públicas, ya no como práctica o entrenamiento, sino como medio de diversión.

Después, el afrancesamiento de la nobleza española causaría que los caballeros se retiraran de las plazas, aunque el germen de burlar las embestidas de los toros ya estaba imbuido entre aquellos que les auxiliaban a pie, quienes descubrían, al tiempo de hacer quites a los hombres de a caballo, que también se podía lidiar sin estar montado.



Al final del siglo XVIII se publicó la primera tauromaquia – **La Tauromaquia o Arte de Torear** firmada por el torero **José Delgado** alias **Illo** y cuya redacción se atribuye a **José de la Tixerá**. **Pepe-Illo** murió a consecuencia de una cornada, recibida en Madrid en 1801, e inmortalizada por **Francisco de Goya y Lucientes** en su serie de grabados titulados **La Tauromaquia**.

No pasaría medio siglo sin que se publicara la segunda tauromaquia fundamental (1836), que es la de **Francisco Montes Paquiro**. Esta obra – **Tauromaquia completa, o sea, el arte de torear a pie y a caballo** –, aparte de la descripción de suertes y comportamientos del toro, contiene un extenso capítulo en el que aparte de las *regulae artis*, se pone por

primera vez un conjunto de reglas de comportamiento – con enfoque jurídico, pues – para toreros, ganaderos y espectadores. Creo que no resulta ocioso señalar que, la totalidad de los reglamentos que en la actualidad rigen la celebración de festejos taurinos, tienen, con diferencias de forma, más no de fondo, la misma estructura de las reglas de **Paquiro**. Tradicionalmente se atribuye al periodista **Santos López Pelegrín Aben – Amar** el carácter de *amanuense* del torero gaditano, pero investigaciones recientes reflejan que quizás el que *tradujo* las ideas del diestro fue el médico militar – también del **Rincón del Sur** – **Manuel Rancés Hidalgo**.

A partir de estas dos tauromaquias, la fiesta de los toros se organiza y entra en un periodo evolutivo. Comienza la selección del toro en el campo, intentando dejar en la menor medida posible al azar – *seguro azar* afirma **Alameda** – su aptitud para la lidia.

A la par de que evoluciona el toro en su comportamiento, el toreo se adapta y adopta nuevas formas, hasta llegar a lo que hoy conocemos. Entiendo que esta explicación se puede considerar bastante simplista, pero el espacio que se me ha asignado no me permite ir avanzando era por era.

Lo que si permanece constante, es que el toro es el eje de la fiesta. Sin el toro, la fiesta no puede ser concebida y perpetuada como expresión artística que es, profundamente arraigada en lo hispano y permanente en nuestros pueblos prácticamente desde que esa hispanidad se origina, hace casi seis siglos.

Así que ¡al toro!, que esta obra apenas comienza.

**\*Licenciado y Maestro en Derecho. Aficionado a los toros. Colaborador desde 1989 de diversas publicaciones impresas y digitales.**

# Toreo kaj Historio

Xavier González Fisher\*

La komenco mem de la interagado de homo kun taŭro –tiu ĉi komprenita *\*gasetiste* (1) kiel “virbovo kiu havas kaston (2), povon kaj kruojn”- estis eternigita detempe de la kavernoj de **Altamira** ĝis la freskoj de **Knosos**. Tiu interagado transiris de utileco ĝis ludebleco; tio kio iam signifis utilon, post la tempo eblas esti ĝi ludo.

Tamen, la taŭrofestoj, kiel ni ĝin komprenas nuntempe, devenas pleje de la okazinta trejnado por batali dum la milito por la Rekonkero de Hispanio. **José Alameda** (3) alĝustigas al tia trejnado okazinta dum la nia erao XVa jarcento la originon de la nuna toreado; eĉ li mem asertas ke ne eblas de la ĉasadoj pentritaj ĉe **Altamira** nek de la mezaj bronzeraaj artpentraĵoj de **Knosos** deducti rilaton –de kaŭzo al efiko- kun tio kion ni hodiaŭ spektas ĉe la taŭroplacaj rondoj.

Mi opinias tiun ĉi *\*alamedistan* teorion kiel la plej kongruanta kun la evoluo de la taŭrofestoj ĝisnune, kaj do, ni vidas ke dekomence okazadis surĉevala toreado, kiel trejnado de kavalerioj –kaj arabaj kaj hispanaj- por militi. La lancelikado de taŭroj bone similis la alfrontadon kontraŭ alia lancisto. Laŭopinie de **Alameda** mem, poste, kaŭze de la fino de la rekonkera milito, kavalerio estiĝis “fluadloko de malseka rivero”, kio alportis tiujn militludojn al la urbaj placoj, jam ne kiel pormilita praktikado aŭ trejnado, sed kiel amuzigaj okazaĵoj.

Poste, la francigo de la hispanaj altklasanoj kaŭzis ke la kavaliroj forlasis la placojn, kvankam la ĝermo de sukceso eviti esti trafitaj de kontraŭmovantaj taŭroj estis jam disemita inter tiuj kiuj surpiede helpadis la kavalirojn, helpantoj kiuj altirante la atenton de taŭro kiu sin ĵetadis kontraŭ jam sen-defenda kavaliro, eklernis ke ankaŭ eblas toreadi sen rajdi sur ĉevalo.

Je la fino de la XVIIIa jarcento oni publikigis la unua taŭrotema verkaĵo

